GISTO, O809
Str.Esperanto, 880
95760-000 Kaiurbo-RS
Redaktis ottovaske@ibest.com.br
Donace por VK-ĉeestantoj
Krom foraj loĝantoj ŝuldas R$ 01,00 al la kaso.

.....

UKE

Tre malmulton mi sukcesis aŭdi pri la dissendo de la Universala Kongreso. Edza devo faris el mi vartistinon de mia edzino kaj ne restas tempo eĉ por enaŭskulti iom pri miaj gekolegoj radioamatoroj. Krome estas miaj tajplaboroj. Tamen ni esperu ke nia kuraĝa VK-rondano Arno, partopreninta en la UKE rakontu al ni pri siaj tagoj ene de la esperantista ĉefurbo/2009, Bialistok kaj sia turistado tra Eŭropo.

DOMAĜO

Krom nia diligenta VK-kompano Solon, neniu plia samideano bonvolis manifestiĝi pri mia nacilingva propono ke, legantoj alsendu ideojn/solvon, en la pasinta Gisto. Tiaj eroj estas kvazaŭ termometro kiu evaluas la intereson de niaj rondanoj pri evoluo en la lingva lerteco. Tiel magra rikolto signifas por mi kvazaŭ: *fuŝulo*, *anstataŭ elkribri legaĵojn, iru dormi,!*

Tio igas min prikonsideri,, ĉu mi ankoraŭ alsendu la bultenon Gisto al gesamideanoj kiuj avaras pri sia ĉarmo kaj negas ĉeeston dum la V-Kafo.

SKLAVIGO

Bildigu al vi ke registaro decidis ŝanĝi de karcero al alketenigo, punojn por kontraŭleĝaj faroj, ke vi hazarde falis en kaptilon kaj devas pagi vian misfaritaĵon per dujara alkatenĝo, poka manĝo kun nur akvo. Ĉu terura kondamno? Certe jes tamen tio okazas al ŝatbestoj kiel hundoj. Tiaj restadas dum la tuta vivo sur sama loko, ligitaj al unumetra kateno, meze siaj ekskrementoj, fiodoro kaj muŝoj, sen rajto promeni ĉirkaŭ la kvartalo almenaŭ unu fojon en monato, eble ne dum pluraj jaroj kaj, des pli malbone ke la hundoj estas senkulpaj. Aldonendas la fakto, ke animaloj, same kiel homoj, havas fiziologiajn necesojn per kiuj ili estas dotitaj, ĉefe la masklaj. Seksrilatoj, inter aliaj necesoj, kiel sin bani, ktp. Eble vi kredas ke ĉiu ŝatbesto sin trovas provizita per tiaj eroj de la vivo. Tute ne. Se al vi ne sufiĉas mia aserto, mi proponas al vi veni kaj vidi tian mizeron, kiun suferas najbara hundeto. Aldone ĝi suferas “tanadon” kiam ĝi nokte bojadas ŝajne sen motivo.

ALMANAKO LORENZ/2009

Ĵus aperis la plej laste eldonita Almanako Lorenz,150-paĝa k multaj bildoj. Enestas vere ĝuindaj tekstoj far dekoj da elstaraj gesamideanoj brazilaj kaj eksterlandaj. Mi ankoraŭ ne tralegis ĝin sed povas kaj devas peti ke ĉiu gaŭĉa samideano akiru sian ekzempleron, por ekscii pri interesaj facetoj de la historio de Esperantio. Nun, dum lanĉaprezo ĝi kostas maksimume R$ 10,00. Malpli, se vi akiras plian eldonaĵon. Jen la adreso:
Editora Leon Denis, Rua João Vicente, nº. 1445 – RIO – kun CEP 21610-210 aŭ pere de editora@leondenis.com.br - Se vi estas konata kliento, vi kontaktas/mendas kaj aldiras ke la korespondan ĉekon vi enpoŝtigas samtempe sed se vi forgesas plenumi vian promeson, eblas ke la alveninta mendaĵo, post pokaj tagoj, memorigos vin pri la hontinda forgeso. – Nepre legu la tekston far Bob Felby, pĝ.133!

ĈRI

En ĉi monato aŭgusto/09 la signalo de ĈRI tre variis, de Signalo nulo ĝis S-9plus, kelkfoje de unu tago al la sekva, ĉiam aldoninte eksteran antenon kaj ĉiufoje tio okazas dum veterŝanĝoj.

Konstato: dum tiuj ŝanĝoj la najbarurba FM-stacio, (120 Km for) invadas mian preferatan stacion en 101.3 Mhc, kiam mi vespere aŭskultas ĝian muzikan programon pere de mia nova radio. La najbara stacio elsendas laŭ 100.0 Mhc. Lastan semajnon mi scivolis kiel la eta radiocrcevilo kiun ĈRI-anoj donacis al mi dum la Fortaleza-BKE. Laŭdinda rezulto! La valora etulo, tre selektema, ne enlasas la trudeman flankan signalon el najbara urbo. Gratulon por la ĉinaj fabrikantoj!

BUĈADO

Ĉirkaŭ 40 jarojn antaŭe mi akiris la bieneton kie mi vivas kun mia familio apud Kaiurbo-RS. Tiutempe mi bredis krom kokinojn, ankaŭ kuniklojn, por la hejma konsumado. Ĉi simpatiaj animaletoj, dum la prizorgado, fariĝis amikemaj, mi povis sidi en la bredejo, ili ĉirkaŭis min scivolaj pri bongustaĵoj, iu greso speciale aprecata. En varmegaj somertagoj la kunikloj proksimiĝis al mi kaj emis leki miajn brakojn, serĉe de salo, el la ŝvito. Venas tago tamen kiam mi devas elpreni unu el ili por buĉi. Tio ja estas korprema afero, mortigi nekulpan amikan besteton. Eble pro la kompato ofte okazis ke mi per bato ne trafis la plej ĝustan punkton de la kolo. Mi devis ripeti la mortigon. Sekvas trista sceno dum la stertoro. Poste oni ligas ĝiajn postajn krurojn kaj pendigas ĝin al hoko, por "senvestigi" kaj eltripigi la viktimon. Dum tio oni sin makulas per sangaj elfluoj. Tre malagrabla tasko farenda pri kiu viandomanĝantoj komisias buĉiston. Tial ili ignoras la aĉan laboron kaj fian agon kontraŭ senkulpaj vivuloj. Jen motivo kial mi ne toleras kadavron sur la manĝotablo kaj vivas multe pli sana.

FORPASO

Konfirmaj vortoj de samº R.Zageto, pri forpaso de la kara sinjorino Izaŭra, edzino de nia veterana esperantisto sinjoro Ivo Sanguinetti, igas min registri, kun tristo, la grandan perdon de valora sinjorino, tre sindona en aferoj helpe al Esperanto. Mi memoras ŝian malavaran gastamon, kiam oni vizitis ilin en la hejmo. Al sinjoro Ivo mi prezentas per ĉi-rimedo miajn sincerajn kondolencojn, ĉar ne plu restis al mi tempo sufiĉa por atingi la entombigan horon.

PURIGADO

Estiĝas interesa iniciato en ekologistaj medioj: ĉiuj homoj, kiuj scias pri la danĝera malboniĝo de nia blueta planedo Tero, negu voĉdonon por ne-ekologistaj, koruptaj kandidatoj al la Senato kaj same al deputitaro. Se granda amaso adheros al la ideo, oni facile forbalaos la "rubaĵojn" el Brazilja. Ni observu kaj voĉdonu atente.

BONA ESPERO

La revuo Esperanto nº.1227 inter la Recenzoj montras tiun pri la libro Idealo kaj Realo, pĝ 158. Ĉiuj gesamideanoj devas legi ĝin, 256 pĝ., p., pi la Fazenda Escola Bona Espero. Hodiaŭtempe alirebla sur asfaltita ŝoseo. Dum la jaroj 1980aj mi veturis tien tamen tra kotaj vojoj, per la aŭto Variant/72, dum pluva vetero., Mezvoje mi preskaŭ rezignis pluiri tamen atingis la celon kaj restadis dum ĉirkaŭ unu monato, por fariĝi helpanto kie necesis kunlaboro. Kompense de la gastigado mi kunportis sakon da rizo kaj aliajn manĝaĵojn. La mastroj, gesinjoroj Ĝiozepe, italo kaj sinjorino Ursula Grattapaglia, germanino akceptis min kaj proponis specialan sinbanon, post la laciga veturo. La loĝejoj estis tiutempe tre modestaj. En la korto videblis pluraj araoj, malsovaĝaj, simpatiaj kaj tre amikaj de homoj. Iun tagon mi iris antaŭtagmeze al la legomejo. Ĝi bezonis sarkadon do mi kuraĝe eklaboris,

senscia pri la tempo. Kiam la suno postlasis la Zeniton mia stomako igis min diveni la tagmanĝotempon. Se iu memorige sonoris, mi neniel aŭdis, cetere neniu instruis min pri io tia. Neniu vokis min. Post lavi min mi eniris la maĝejon, trovis tablon ĉirkaŭitan de granda rondo kiu enhavis la mastron Ĝiuzepe, homo sprita kaj ŝercema, ofte iom rikanema. Mi ĉetabliĝis kaj, kiel decas, laŭte demandis ĉu mi, malgraŭ la prokrasto, rajtas tagmanĝi. Duon serioze kaj ŝerce li diris nur: escepte, jes. Tiel komenciĝis mia tiea restado. Samtempe tie aktivis angla fraŭlino (eble Saly(ĉu?) estis ŝia nomo?) fervora esperantistino, de kiu mi aŭdis iam: la angla estas hunda lingvo, per ĝi usonanoj bojas.

Iam la traktoro de la bieno paneis. Ĝi staris sur deklivo, Giuzepe kaj skipo decidis startigi la motoron per puŝo kaj tirado. Giuzepe komandis. Delasinte la bremson, helpe de pluraj homoj ĝi ekfunkciis ĉe instigaj laŭtoj. Huraoj kronis nian sukcesan taskon. Estis tamen la risko, ke tirinta homo falos kaj estos trafita de la peza veturilo.

Tiutempe, apud la domoj, la vojoj fariĝis glitaj je ĉiu pluvo. Mi memoras ke oni metadis palmbranĉojn kaj arbustajn branĉarojn transe de la vojoj por ebligi atingi la direkton ĝustan. Iam sinjorino Ursula, lerta pri pilotado sur tiuj vojoj, fortiris min de malantaŭ la stirilo kaj ŝi mem veturigis la Variant ĝis pli fidinda grundo.

Tre sindona kaj laborema ino estas ŝi. Post la UKE/1981, sinjoro Dionizjo, fraŭlino Rosana kaj mi vizitis la bienon. Kune kun aŭstraliaj geedzoj ni ekskursis tra la granda bieno Antaŭ ekveturi revene al Brazilja/Kaiurbo, tiu proviziema sinjorino mem iris al la kuirejo kaj provizis nin per provianto sufiĉa por longa veturo.Tial ke nia ekveturo devus esti tre frumatene, la ekveturonta kvaropo decidis ne veki multajn bienanojn. Ni adiaŭis nur de tiuj homoj kiuj jam aktivis je tiu horo. Veturinte kelkajn centmetrojn oni devis surpasi tre primitivan ponton el lignaj ŝtipoj. Okazis ke mi veturigis tre zorge kaj malrapide. Momenton mi haltis. Je reekveturo la ŝtipoj sub la radoj disiĝis. Unu rado pendis sur la abismo de ĉirkaŭ 10m. Ni bezonis helpon. Mi forgesis la nomon de la kvara kompano,kiu volontulis piediri ĝis la domaro kaj kunvoki helpantojn. Post kelkaj longaj minutoj alvenis taĉmento .Kompreneble li devis unue ellitigi la volontulojn. La savadon ordigis nia helpema Ĝiuzepe. Li zorge observis la problemon antaŭ ol ekagi tamen ne sen ataŭe rikani: En tiun kaptilon falas maldankaj vizitantoj, kiuj forveturas sen adiaŭi.

Jen leginda teksto far David Koimbra, el ZH, kun mia pardonpeto pro la enlaso de etaj sed oportunaj krokodilaĵoj usonlingvaj.

TERURA MALVARMO

Iam mi vidis Fuska-markan aŭton parkitan en la urbeto Brekenridge, Kolorado,Usono, unu el tiuj statoj akurate rektangulaj. Tie situas la Montoj Rokecaj, loko malvarmega kaj neĝokovrita, kien la homoj veturas por skii. La ĉefurbo de Kolorado estas Denver sed mi gastis en Brekenridge. Tie mi vidis la menciitan aŭton. Ĝi estis blua. Iu starigis ĝin antaŭ la restadejo en kiu mi gastis. Je vesperiĝo, antaŭ ol eniri la gastejon mi alrigardis la aŭton kiu staris kelkajn metrojn for. Mi endomoĝis kaj ne plu pensis pri la malgranda aŭto. Tuta nokto forpasis. Sekvan tagon, kun la ceteraj ĵurnalistoj ni preparis nin por skii, Aŭ provi la skiadon. Nia instruisto, granda usonano, nia instruisto, granda usonano, ruĝa kun ĉemizo el ŝakforma teksaĵo, avertis: ni eluzos multan energion ĉi-morning. Mi obeis. Troveblis pleto kun kolbaso kaj ŝinko por la malfasto. Fritita kolbaso kaj ŝinko en abundo da oleo. Mi manĝis. Estis patkuko kun melaso. Diketa fritkuko kun densa melaso. Tion mi ankaŭ manĝis. Plus buterpano kaj

fromaĝo.Plus ĉokolada kuko. Ĉion kun kafo, memkompreneble. Mi eldomiĝis rebrila pro energio, preta por intensa skiado. Tiam mi revidis la Fuska-aŭton. Pli ĝuste: ne vidis. Anstataŭ la aŭto videblis monto da glacio. La nokta neĝado plene kovris la aŭton. Tiam mi pensis...kamarado, ĉi tie ekstreme malvarmas. Jes, tamen mi daŭris ĉe la ideo ne surmeti longan kalsonon. Ĉiuj miaj kolegoj ĵurnalistoj surmetis tian longan subveston sed mi nee balancadisla kapon kaj diradis:
- Ne, kompanoj, mi estas viro kiu ne surmetas longan kalsonon.

Saman posttagmezon mi paŝadis sola tra la Brekenridge-stratoj kaj, subite la suno ne subiris, ĝi falis. Estis hela tago kaj post unu minuto estis nokto. Pro la nokto la malvarmo fariĝis akuta kiel avanulo de la jaroj 70-aj. Senteblis ke mi glaciiĝas. Envenis mian kapon la milita operacio Barbarosa, la invado de la Sovieta Unio fare de la hitlera armeo en 1941. La germanoj frontis unu el la plej aĉaj vintroj de Rusio. La brulŝtofoj glaciiĝis en la ujoj. Nazoj kaj oreloj duriĝis kaj rompiĝis. Se soldato devis urini, la peniso glaciiĝis kaj je la manipulado por surloken remeti ĝin, “krek”, rompiĝis.
Mi ne emis pisi ie en strato de tiu urbeto sed mi sentis ke mia dikŝtofa pantalono ne sufiĉe ŝirmis min kontraŭ tia malvarmego. La malvarmo ascendis ekde la piedoj kaj streĉigis miajn krurajn muskolojn. Tree mi bedaŭris mian sintenon kontraŭ la dika subvesto. Kiu envere estis la problemo uzi dikan longan kalsonon? Mi bildigis al mi ke iun tagon iu havis la penison erigita. Tia ebleco, ne bonfartigis min, fakte ne. Krome, en la plej aĉa hipotezo povus rompiĝi mia nazopinto aŭ orelaj loboj. Kristo!

Savis min la ekvido de drinkejo apude. Puŝinte la klapajn-pordon, mi enŝoviĝis. Aŭdiĝis country-muziko. Ĉe la vendeja tablo ŝtaris viroj. Ili drinkadis senbrue. Ĉiu metis staketon da dolaroj sur la vendotablon antaŭ si kaj mendis drinkaĵon. La kelnero ĉiam deprenis nur la kvanton korespondan al la prezo kaj metis la apunton flanke de la staketo. Mi faris same, deponis kelkajn dolarojn antaŭ mi kaj mendis:
- Unu *bourbon,*plis. Tiam mi pliafoje rezonadis pri la tiea malvarmego. Troveblas homoj kiuj asertas ke en Riogrande do Sul oni sentas malvarmon tian ke eĉ rusoj priplendas la gaŭĉan vintron. Kun permeso via! Ni troe entuziasmiĝas, la plej belan sunsubiron de la mondo, kvazaŭ la suno ne subiras ĉie en la mondo, ĉiutage, excepte eble de Grenlando. La urbo politike plej klera kun siaj,Vargas, Oswaldos kiuj diskursadis antaŭ iu ajn populara municipa konsilantaro. La plej belaj virinoj de la Tero, kie la Gizelaj kaj Ambrozioj veturas pendantaj de busoj. Ba! Estas nur unu perforto laŭ kiu la Gaŭĉolando fakte ne supereblas. En neniu alia loko de la mondo la malfeliĉego de kontraŭulo tiome ĝojigas kiel okazas inter pasiaj partianoj de la futbala duopo Gre-Nal. Neniu abomenas tiel timindan rivalon kiel estas gaŭĉo.

Iom ridiga:

ITINERO

Scivola civitano demandis al aviada piloto, kial kelkaj avioj postlasas blankajn striojn dum ili flugas.
- Tion faras nespertaj pilotoj, kiuj ankoraŭ ne sufiĉe lernis la navigadon, por trovi la ĝustan revenvojon. Brazilanoj kutimas ŝovi tiajn mallertaĵojn en la poŝojn de portugalaj skipoj. Reciprokoj okazas.

Serioza klarigo: tiujn striojn kaŭzas la amaso de varmegaj gasoj ellasitaj de la turbinoj en temperaturo pli malalta ol -36ºC, en nivelo ĉ. 10.000m alta, depende de la latitudo.

Far Gandhi: **Vi devas esti la ŝanĝo kiun vi volas kaŭzi al la mondo.**